

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

NUMERO 288 (55) - KVINA EPOKO

MARTO 1994



- Eùropa Parlamento kaj esperanto
- Delfí Dalmau
- Zamenhof-tago
- KEA kongresas en Alcúdia
- KEJ kunvenas en Sant Celoni
- Internaciaj Floraj Ludoj
- Raymond Schwartz
- Aùtomata tradukado

**ASSOCIACIÓ
CATALANA
D'ESPERANTO**  **KATALUNA
ESPERANTO-
ASOCIO**

(Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785)
 Apartat/Poŝtkesto 290 - 08200 Sabadell - Catalunya/Katalunio. Tel. (93)716.36.33 (ekde lundo ĝis vendredo inter la 16a kaj 20a h.). FAX (93)727.42.08. Kolektiva membro de Kooperativo de Literatura Foiro. Kun laborinterkonsento kun la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino.
 KOTIZOJ POR LA JARO 1993: Individua Abonanta Membro 3.000 p-toj; Individua Subtenanta Membro 6.000 p-toj; Individua Dumviva Membro 60.000 p-toj; Kolektiva Membro 6.000 p-toj.
 BANKO: Caixa de Pensions - agència 461 - Sabadell - konto: 550-53.
 PLENUMKOMITATO DE KEA: Prezidanto: Josep Franquesa; **Vicprezidanto:** Maria Nuez-Garcés; **Ĝenerala Sekretario:** Llibert Puig; **Vicsekretario:** Hektor Alos; **Kasisto:** Lluís Armadans;
Komitatoj: Miguel Ángel Altuna, Bartomeu Costa, Joan R. Guinón, Girona Espero, Francesc Ibáñez, Joan Marimon, Josep Ma. Milla.
 KONTROLA KOMISIONO: Tomàs Alberich, Ricard Jordana, Òscar Puig.
 KATALUNA ESPERANTISTO: Hektor Alos, Ferriol Macip, Llibert Puig.
 Redaktoro pri la paĝoj por komencantoj kaj progresantoj: Gemma Armadans.
 La artikoloj publikigitaj en *Kataluna Esperantisto* ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.
 KATALUNA ESPERANTO-JUNULARO: Apartat 32.318, 08080 Barcelona.
 Dipòsit Legal: B-27362 - 1982. Presita ĉe **Ràpid Graf**. (93)725.50.91. Sabadell.

Post Eco kaj Verne ŝajne jam nenio povis nin surprizi. Tamen, gravuloj de la Eŭropa Parlamento kunvenis por pritrakti la eblan utilon de planlingvo. Oni devas bone noti, ke la konferencon ne organizis la Eŭropa Parlamento mem, sed ankaŭ ne la esperantistoj: fondaĵo ligita al la bavara socialkristana partio venigis ĉe la Prezidanton de la Parlamento, la direktoron de ties tlingva servo kaj kvindekono da deputitoj.

La okazaĵo verŝajne pli gravas ol ajna nebula favora deklaro de internacia organizo: unuafoje grava institucio (aŭ almenaŭ pluraj el ĝiaj plej elstaraj membroj) akceptis diskuti la aferon de internacia helplingvo kaj efektive kunsidis pri ĝi.

Bedaŭrinde la esperanto-movado malmulte tuj profitos per tio. Kvankam la konferenco okazis septembre novaĵo pri ĝi ne atingis nin ĝis du monatoj pli poste: jam indis neniun gazeton informi pro malfruego.

Laŭdire ĉi-jare oni denove pli profunde kunvenos pri la sama temo. Estos interese denove vidi la pozicion de la Eŭropa Parlamento, kaj espereble ĉi-foje ni povos tuj informi la gazetaron.

Pardonpetego

La antaŭa duobla numero de nia revuo, kiu celis agrable surprizi nian legantojn, fine ŝokis skue ankaŭ siajn redaktintojn. Ĝiaj nepoluritaj kaj eĉ erarplenaj lingvaĵoj kaj prezento ŝuldiĝas al komputila fuŝo: oni sendis al la preseo ne la finan version de la revuo, sed komencan nekorektitan malneton. La redaktoroj hontege pardonpetas al la legantoj kaj kunlaborintoj pro la okazaĵo.

Dua Internacia Semajno

**15a - 22a de oktobro
Sant Cugat del Vallès**

**ORGANIZAS:
Hispana Esperanto-Muzeo**

Junularaj aranĝoj por 1994

**23a - 24a de aprilo
KEJ-renkontiĝo**

**29a de oktobro -
1a de novembro**

**KEJ-diskutkunveno:
BABELE BABILI**

Delfí Dalmau en Avenç

La decembra numero de *Avenç* publikigas artikolon titolitan *Delfí Dalmau, en la convergència entre catalanisme i universalisme*. Sur ses paĝoj la aŭtoro, Jordi Soler i Camardons, analizas la figuron de Delfí Dalmau, pedagogo, iama Prezidanto de Kataluna Esperanto-Federacio kaj iniciatinto de la Departamento de Esperanto ĉe Klubo de Amikoj de Unesko. Kompreneble, la studon atentigas la esperanto-agadon de nia pioniro.

Vasta informado en Majorko

Okaze de la 26a Kataluna Kongreso de Esperanto en Alcúdia, la majorkaj esperantistoj multobligis por ĉie informi pri nia afero. Antaŭ la kongreso, en Ràdio Algaida kaj Ràdio Alcúdia oni intervjuis Xavier Margais kaj Mateu Vich. La unua ankaŭ prelegis kadre de la Literaturaj Vesperejoj de la biblioteko Can Torró, kiu poste gastigis niajn Florajn Ludojn. Ankaŭ en la Filologia Departamento de la Universitato de la Balearaj Insuloj li prelegis pri *Esperanto en Majorko* antaŭ 70 studentoj kaj okazis projekcio de la filmo *Mefisto* dublita al esperanto.

Antaŭ kaj dum la kongreso estis prezentita en Alkudio brila ekspozicio pri la historio de la majorka esperantistaro.

En la gazetaro, la semajna gazeto *La Nau* duonpaĝe atentigis pri la kongreso. Post la kongreso *Diari*



de Mallorca en sia eldono de Inca informis per tuta paĝo pri ĝi. Ankaŭ la valencia *El Temps* mallonge notis ĝin, asertante i.a. ke la katalunlingva rok-grupo Pixamandúrries koncertis en la internacia lingvo (kio malveras, kvankam laŭdire tiu grupo posedas du kantojn en esperanto aperontajn en sia venonta disko).

Entute, tre sukcesa kongreso el la informa vidpunkto dank' al niaj majorkaj samasocianoj.

Unua Internacia kultura kaj turisma semajno

Tre sukcese finiĝis la unua Internacia Kultura kaj Turisma Semajno, kiu okazis en Sant Cugat del Vallès

de la 9a ĝis la 16a de oktobro. La precipaj aktivajoj estis: ses prelegoj (el kiuj unu pri la poeto Federico García Lorca fare de Miguel Fernández, kaj prezentado de la Poemo de Utnoa fare de Abel Montagut), tri ekskursoj (du al Barcelono kaj alia al la Muzeo de Esperanto en Sant Pau d'Ordal), kaj du koncertoj.

De la 15a ĝis la 22a de oktobro samloke oni reokazigos tiun ĉi aranĝon. Dezirantoj prelegi aŭ prezenti librojn bonvolu sin anonci al la organizantoj:

- Kultura Sekcio de Hispana Esperanto-Muzeo
Poŝtkesto 15207
08080 Barcelona

Hispana Esperanto-Muzeo

TEJO ĉe ni

La Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO planas okazigi en Katalunio seminarion en printempo 1995. La Eŭropa Junulara Centro (organizo de la Eŭropa Komunumo) subvencias tiujn aranĝojn, kiujn partoprenas ĉ. 40 selektitaj aktivuloj.

Habelido

Eloi Montagut naskiĝis la 15an de novembro. Li estas la unua filo de Jesús Abel kaj Montserrat.

Nou llibre

S'ha publikat el llibre *El esperanto: fenómeno de la comunicación* de William Auld, traduiĝ al castellà per Marcos Cruz, secretari de la Federació Espanyola d'Esperanto. El llibre està escrit pel que es considera el més gran poeta viu en esperanto i analitza l'esperanto com a llengua, literatura i cultura. L'edició conté abundants notes a peu de pàgina i apèndixos molt interessants per a castellanoparlants.

L'esperanto al Parlament Europeu

El 29 de setembre es va celebrar a Brussel.les un seminari sobre el tema *El problema de la comunicació i de la llengua a la Comunitat Europea: Fins a quin punt una llengua planificada podria contribuir a la seva solució?* El seminari, que va aplegar un centenar de participants, va ser inaugurat per Egon Klepsch, president del Parlament Europeu.

Entre els oradors, els polítics, malgrat les seves al·lusions a problemes importants de comunicació, majoritàriament van defensar el sistema plurilingüe tradicional. Heinz Zerwes, director del servei lingüístic, va reconèixer que *"la diversitat de llengües és cara"*, però va recalcar que, a l'hora de proposar una llengua planificada com a alternativa, cal estudiar quant costaria preparar professors d'aquesta llengua, si tindria


Zamenhof-festo en Majorko

La naŭ majorkaj esperantistoj kunvenintaj la 19an de decembro en kampara domo por festi la Zamenhof-tagon ricevis la agrablan viziton de Perla Martinelli kaj Giorgio Silfer.

Zamenhof-festo en Sabadell

Kiel ĉiujare dum la tago de Zamenhof, la promenantoj sur la Zamenhof-bulvardo en Sabadell senpage povis abunde matenmanĝi bongustegajn klaborojn kun ĉokolado, honore al nia Majstro. Lige kun la *Internacia Jaro de la Indigenaj Popoloj*, Centro de Esperanto Sabadell organizis surstratan desegno-konkurson por infanoj pri tiu temo. *Lliga dels Drets dels Pobles*, kiu jam plurfoje kunlaboris kun la esperantistoj, stariĝis budon por solidareco kun la juri-magvoj. Vidalvide la Centro havis sian klasikan libroservon.

Dum 50-60 esperantistoj (kaj multaj preterpasantoj) partoprenis la matenan aranĝon, nur deko komune tagmanĝis, eble pro la malfrua anonco.



Zamenhof-festo en Barcelono

Pli ol 50 homoj festis la 30-jariĝon de la Departamento de Esperanto en Klubo de Amikoj de Unesko en Barcelono dum la Zamenhof-tago. Narcís Fluvià fake prelegis pri la historio de la esperanto-grupo lige kun la tuta historio de la kataluna esperanto-movado. Kiel tradicie, post la prezento oni kolazionis kaj ŝaumvine tostis.

[Aperis artikolo de Lluís Armadans pri la historio de la Esperanto-grupo Miquel Vilagran ĉe Unesko-klubo en *Monda forumo*]

Stato de la fondaĵoj

Fondaĵo Floraj Ludoj

Antaŭa stato	16.000
Anonimulo	3.500
Lluís Armadans	800
Joan Martínez.....	5.000
Peter Holt	2.000
Entute.....	27.300

Fondaĵo Eldonaĵoj

Antaŭa stato	300
Jordi Carbonell	1.800
Josep, Tomàs i Frederic	
Alberich i Jofré.....	10.000
Entute.....	12.100

acceptació social i com s'elaborarien en aquesta llengua els centenas de milers de termes necessaris.

El doctor Detlev Blanke va presentar la interlingüística, branca de la lingüística que estudia les llengües planificades, mentre que Claude Piron, psicòleg, va analitzar les causes per les quals algunes persones tenen aversions inconscients a les llengües artificials.

A continuació, es van presentar les llengües glosa, interlingua i esperanto i l'interlingüista Don Gaspar, en comparar-les, va assegurar que les seves diferències eren causades pels seus objectius diferents. Diversos ponents van posar de relleu graus importants d'"artificialitat" en llengües "naturals", com l'indonesi i el romanx.

A la taula rodona final es va concloure demanar al Parlament Europeu de crear un

grup de treball per estudiar la qüestió. Es preveu també organitzar enguany un seminari més llarg sobre el tema.

Sabieu que...

a la cimera de Maastrich, el 1991, van caldre més de 900 intèrprets?

(jeunEsperanto)

Esperanto en el transsiberià

Un grup de joves esperantistes viatjarà en tren el juliol durant tres setmanes des de Moscou fins a Ch'onan, a Corea, per participar en el Congrès Juvenil Inter-

nacional. Els viatgers faran parada en una o dues trobades esperantistes a Sibèria i s'estan planificant activitats per combatre el tedi del viatge en el mític transsiberià.

Bisbes esperantistes

Miroslav Vlk, arquebisbe de Praga, ha estat elegit President de la Conferència Episcopal Europea. No cal dir que és esperantista.

El Dr. Paul lby, també parlant de l'esperanto, ha estat anomenat Bisbe d'Eisens-tadt, a Àustria.

(La Brita Esperantisto)

Post 66 jaroj en Majorko

Depost la kongresoj en Palma (1925) kaj Sóller (1927) la kataluna esperanto-movado ne estis organizinta sian kongreson en Majorko - nur Kataluna Esperanto-Junularo renkontiĝis en 1989 en Sóller. Majorko -post Barcelonès, Vallès Occidental kaj tre proksime de Garraf- estas la kvara regiono de KEA laŭ membraro: juste estas, ke nia Asocio klopodu organizi aranĝojn en regiono, kie ilia manko forte sentiĝas.

Trideko da kontinentuloj flugis aŭ ŝipis el Barcelono al la insulo, al kiuj aliĝis kelkaj eksterlandanoj kaj ĉ. 15 majorkanoj. Multaj aliĝis solidarece, sed ne partoprenis la aranĝon.

La belege lazura vetero de la milda majorka decembro pli dispelis la kongresanojn al kelkopaj promonadoj aŭ turismumoj en la mirinda Alcúdia, ol al kongresa enkaĝiĝo. Tamen ni povas elstarigi la malferman prelegon de Xavier Margais pri *La komerca agado en la majorka esperantista historio* kaj la tradiciaj Internaciaj Floraj Ludoj, ferme de la kongreso.

La kongreso diskutis pri tri temoj, en samtempaj laborgrupoj. Joan Ramon Guiñón gvidis la rondon pri *Neŭtraleco en la esperantomovado*, Hektor Alos tiun pri literaturo, kaj Llibert Puig pri *Eŭropo*. Nur ĉi lasta redaktis konkludojn.

Vespere, la hungara kantistino Anjo Amika recitalis per sia purega voĉo, aŭ la kongresanoj vizitis lokan danco-grupon por konatigi kun la majorka folkloro kaj lernis danci boleton.



FOTO: Lluís Aragay

Katakombaj esperantistoj

Pollença-ano vizitis nian kongreson por persone konatigi kun sia germana korespondanto, kun kiu li intersanĝas leterojn de antaŭ 30 jaroj. Memstare lerninte esperanton, dum tri jardekoj li neniam vidis esperantiston kaj neniam aŭdis aŭ parolis esperanton. Kompreneble neniu majorka aktivulo sciis pri li.

Ĉar li aperis en la kongreso ĝuste, kiam ĵurnalisto intervjuis Xavier Margais, tiu facile povis eviti la ĉiam tiklan demandon pri la nombro de esperantistoj en Majorko: kiu povas scii, kiom da katakombanoj ekzistas?

Hungaroj vizitas Alkudion

La hungara kantistino Anjo Amika, kiu partoprenis la kongreson, deziris kanti Ave Maria en esperanto dum la dimanĉa meso de Alcúdia. Membro de la kongresa komitato akompanis ŝin kaj interkonsentis kun la pastro pri la afero.

Efektive Anjo Amika jam pretiĝis kanti antaŭ la preĝejo, kiam la pastro volis prezenti ŝin kaj klarigi la maloftaĵon. Jen, laŭ li, staris membro de hungara grupo, kiu dum tiuj tagoj vizitis Alkudion, kaj kiu kantas "en sia lingvo" Ave Maria.

Anjo Amika kantis en esperanto kaj neniu povis klarigi al la anaro, ke ŝi estis la nura hungaro el grupo de esperantistoj!

Debato pri Eŭropo

La laborgrupo pri Eŭropo kunvenis trifoje kun entute 15 partoprenantoj. Ĝi konkludis:

- 1- Rekomendi al la membroj de nia Asocio, ke ili kunlaboru en solidarecaj kontoj por la urĝa situacio en Balkanoj, ĉefe tra internaciaj esperanto-organizaĵoj;
- 2- Ke nia Asocio informu maksimume du-foje jare la eŭropajn deputitojn pri seriozaj esperantistaj rezolucioj;
- 3- Proponi kunlaboron al Eŭropa Esperanto-Unio kaj ricevi dokumentojn intersanĝe;
- 4- Proponi starigi eŭropan rubrikon en nia revuo.

Veterano

Marià Jacquotot, Prezidanto de la Loka Kongresa Komitato de la ĵusa kongreso en Alcúdia kaj nura majorka esperantisto postrestinta el la tiea antaŭmilita movado, forpasis la 2an de januaro post 96 vivoplenaj jaroj.

[La novaĵon dissendis *Catalunya Ràdio*]

INSTITUCIO DE LA
KONSERVANTARO
DE LA INTERNACIAJ
FLORAJ LUDOJ

33aj INTERNACIAJ
FLORAJ LUDOJ

VERDIKTO

- Premio *Eglanterio*
Verko: Patrino
Aŭtoro: Georgo Kamaĉo
- Premio *Violo*
Verko: Oksfordo
Aŭtoro: Georgo Kamaĉo
- Premio *Amarilido*
Verko: Arnim
Aŭtoro: István Ertl



FOTO: Lluís Aragay

Patrino

Vi kreis min. Mi sciis vin ĉiama,
konsterne bela (vide, ride, lipe),
humure bonhumora kaj, precipe,
proksime kaj intime akompana.
Naivo reva kaj beat' infana
en mia menso sinkas penso-vipe.
De nelge mi funebras anticipe:
foriros vi - cetero restos sama.
Karesas temp' kancere; vivo, lepre.
Morto regalias nin per solidara
livero de silenta malfeliĉo.
Asertos poste voĉo sperta: "nepre
necesas nur rezignaci' amara",
kaj nomos ĝin, konsole, "maturigo".

Georgo Kamaĉo
(Premio *Eglanterio*)

Oksfordo

Paroloj kaj silentoj pacience
gravuris, skulptis, stompis sur la muroj
de scio-katedraloj la murmuron
de jaroj kaj centjaroj da scienco
kaj arto. Pulsas plue la potenco
anim' de librotekoj, plenmatura,
aroma por eterne kun la puro
de spitaj, spritaj, splitaj konsciencoj.
Ekster la muroj kalmas la natur',
delektas vidon strangaj kavaliroj:
kverkego, karmo, cervo kaj sciur'.
La urbo kariljonas kurt-distance,
kie neniam klakis disonance
la botoj de naziaj oficiroj.

Georgo Kamaĉo
(Premio *Violo*)


86a Franca Kongreso

**11a-15a de majo
en Agda (Lengadoko)**

20a Internacia Semajno

**3a-10a de septembro
en Seta (Lengadoko)**

Kun esperanto-kursoj!



Arnim

AVIZO: Ĉia similo de la menciitaj lando, personoj, lingvoj kaj eventoj kun la realo estas pure koincida, kaj tial des pli maltrankviliga.

Arnim Püchler ĉiam lernis lingvojn, ekde kiam li konsciis pri si. Unue siajn gepatrajn, la germanan kaj hungaran. Poste tiujn de kelkaj klaskamaradoj kaj eĉ parencoj, la serban kaj la rumanan. Kiel sesjarulo, li ne povis konscii pri sia bonŝanco: li tenis enmane la ŝlosilon al kvar lingvogrupoj.

Nur poste, loĝante en la nova lando, kiu tiel facile akceptis lin sia ŝtatan, li komprenis pri siaj kapabloj. Lerninte la anglan kaj la francan, li rapide dungigis gimnazia instruisto pri ili. Ferioj baldaŭ aldonis la hispanan, italan, eĉ katalunan. Farigis lia hobbio, lia ripoziga narkotaĵo, vori ĉiam novajn kaj novajn lingvojn. Sur lia bretaro vicis volumoj de *Teach Yourself*, *Assimil* kaj *Langenscheidt*. Lia edzino ĉiam plendis pri tiuj "polvokaptiloj".

Kvardekjara, Arnim scipovis legi en trideko da lingvoj, ĉefe eŭropaj, kapablis turismi en dudeko, babili en deko, kaj plenalore komuniki en seso da ili. Li estis la poligloto prirevata de tiuj naivaj Eŭrop-faristoj kiuj kredas kun firma stulto je la senĝena multlingveco de l' futuro.

Kompreneble, li ne povis preteratenti Esperanton. Li apenaŭ bezonis lerni ĝin, tuj abonis la ĉefajn revuojn, kiuj instruis lin pri la fajnaĵoj de stilo. Li ŝatis la lingvon, sed ne la nefineblajn diskutojn pri interna ideo, strategio, "landa agado" kaj similaj. Neku-raceblaj idealistoj, li pensis. Ili lernu ankaŭ aliajn lingvojn. Kiam li legis pri la sieĝo de Sarajevo en Esperanta gazeto, li senpacience mansvingis: jen kio demonstras la naivecon de tiuj intern-ideistoj! Jen kiel plezure kaj feroce interbuĉas sin samlingvanoj!

Arnim scipovetis ankaŭ la turkan. Fakte, li aspektis iom turka. Li ŝatis foje sidadi en porturkaj kafejoj, subaŭskulti, kompreneti, eĉ esti alparolata. Li facile kredigis ke li estas duageneracia turko. En tiuj kafejoj li komprenis sian veran motivon de lingvolernado: ĉiu nova idiomo malfermas la imagon al potencialaj vivoj.



Kia mi estus se mi naskiĝus dano? Kiajn frazojn mi dirus ĉiutage se mi estus greko?

La tagon kiam la intercivilita milito eksplodis en Germanio inter la Kohl-anoj kaj la Gröbelbauer-istoj, Arnim estis spektanta portugaliajn tele-novaĵojn. En la portugala atingis lin la informoj pri "firmaj paŝoj kontraŭ la terorismaj elementoj endanĝerigintaj la publikan sekurecon en Germanio". Tiam li tamen reŝaltis al germana kanalo, kiu informis pri la mitralado en la tutfrasa, ĵus finkonstruita ministeria kvartalo de Berlino. Sur Reichstag fliris svastika flago - ne estis klare ĉu ĝin hisis la insurekciianoj aŭ ĉu ĝi signis kapitulacion.

En la postaj tagoj ne estis sekure iri surstraten, eĉ ne en la ĉiam pacema bavara urbeto kie Arnim loĝis. Li kaj la edzino restis do hejme, telespektis la linĉadon de turkoj kaj de ministroj, la potenc-prenan paroladon de Popolestro Gröbelbauer, la zorge montratan paf-ekzekuton de "la senhonta diktatoro Kohl, kiu profitis la justan deziron de ĉiuj germanoj vidi sian patrujon unuigita, por puŝi ĉiam pli da veraj patriotoj en la mizeron, kaj por trapumpi la arjan vivoforton de la germana raso en la mucidajn varikojn de la sangavida kosmopolita judaro".

UN kunsidis, NATO kunsidis, la Eŭropaj Komunumoj kunsidis. La monda gazetaro parolis pri sendado de UN-trupoj, sed tion Germanio, membro de la Sekureca Konsilio, vetis. Ĉiukaze, ĉiuj UN-fortoj sidis implikitaj en Bosnio, Somalio, Hungario, Kamboĝo, Kanado kaj tiel plu: landoj kies longdaŭra krizo ne plu interesis la mondopinion.

Arnim eklernis la islandan. La plej pure germana lingvo, li pensis. En la trudita senageco li progresis kun mirinda rapido, kaj en du monatoj li ellernis eĉ la enhavon de sia mezgranda vortaro. Enpense li ofte navigis kun vikingoj tra la marvastoj ĝis Vinlando kaj Sicilio - tamen, pli ofte li sentis iun ĝisostan froston blovi el la islandaj vortoj, akraj kiel vikinga sabro.

Kiam la brunkaskuloj komencis starigi la edukkampojn, Arnim ĉesis rigardi televidon. Li pli kaj pli ŝlisis sin en la necesejon, la edzino ne komprenis kial. Paperbruo ŝajnis atesti ke li relegas sian islandan lernolibron tie.

La membrolisto de Germana Esperanto-Asocio utile helpis por pleniĝi unu el tiuj kampoj kie la unutaga edukado efikis poreterne. Nun Arnim ĝojis ke li ĉiam abonis nur eksterlandajn gazetojn.

Kiam brunkaskula taĉmento sonorigis je la tria matene, la edzino malfermis la pordon. Puŝinte ŝin flanken, la uniformuloj rapide trovis la korpon de Arnim, kun rompita fiolo inter la dentoj, en la necesejo. Ili ne multe zorgis pri manskribita kajero, kiun Arnim krampe tenis en la manoj. Se ili scipovintus legi la islandan, ili povus legi tie: *Ideala lingvo por la homaro, el 40 lingvoj selektita de Arnim Püchler*.

En tiu kajero belodoris vortofloroj novlatinaj, ĝardenistis germana rigoro. Sur la semantikaj kampoj regis paco kaj trankvilo. Nur foje ŝirblovis dolorkrioj, en iu el la formortantaj lingvoj de la mondo.

István Ertl
(Premio Amarilido)

Intergeneracia seminario junulara

La 3a Diskukunveno de KEJ, unuafoje "internacela", vekis nul intereson transpirenee: ĝia vigla temo (*Sekso kaj esperanto*) kunvenigis ĉ. 55 homojn -el kiuj, ekster la Kataluna Princlando, kvin kastilianoj, kvar valencianoj (neniu burĵasotano!), unu galego kaj unu aŭstro. Eĉ se la organizantoj bedaŭris la neĉeeston de eŭskoj kaj tuluzanoj, ili ja ŝatis, ke la junema anaro aĝis de tri ĝis 60 jaroj.

Tiu ĉi plej partoprenita renkontiĝo de KEJ estis la plej vigla kaj interesa. Dum tri tagoj (30a-31a de oktobro kaj 1a de novembro) la partoprenantoj povis aŭdi ses prelegojn pri: *Tabuaj esprimoj en esperanto* (Hektor Alos), *Ĉu porni aŭ ne porni en esperanto* (Georgo Kamaĉo), *La erotika esperanto-literaturo* (Antonio Valén), *Aidoso: la evitebla malsano* (Helmut Brath, kun abundaj prikomentoj de Jesús Muinhos), *Geja emancipiĝo* (Helmut Brath), *La Amkantoj de Ausiàs Marc* (Abel Monta-

gut, kun kantado de Xavier Rodon) kaj -eksterprograme- ankaŭ Markon Frateko. Aldone, Josep Maria Milla gvidis enketon (per kiu evidentigis, el la dekkvino da respondintoj, ke esceptis tiuj, kiuj ne fikis kun alia esperantisto, dum triono iam samseksumis), Felip Artero estris trinkejon (kie oni nur kafo-teumis, anstataŭ gustumi la oficialan renkontigan trinkaĵon: *sangosoifa eliksiro*). La unuan nokton, Núria Ollé kaj la kamikazan kuiristaron pretigis *afrodizian vespermanĝon* (laŭdire, kun tre agrablaj postsekvoj ĉe kelkaj). La duan, Cen-

tro de Esperanto Sabadell organizis tipan kaŝtanfeston. Ankaŭ nokte oni povis ĝui interkonajn fido-ludojn, danci (ĉi tie ĉiuj malinoj forvaporigis) aŭ samtempe spekti po du ĵurasajn pornofilmojn sammure projekciitajn de Josep Virgili. Laste, Gemma Rodon kaj Xavier Armadans, krom bonege aranĝi la tuton, respondecis pri la tria interesege dosiero de KEJ: 80 paĝoj pri *sekso kaj esperanto!*

Post tiu bunta kaj sukcesa aranĝo, KEJ planas en 1994 samdate organizi sian venontan Diskutkunvenon.

18a Internacia Junulara Festivalo

Narkotaĵoj en la naŭdekaj jaroj

30a de marto - 5a de aprilo

Pracatinat (Piemonto)

Florludeske

Al KEJ-membroj mi donu aplaudon mirgapante pri l' laboroj penaj, organizo, zorgo, sekskunvenaj, elvekantaj de l' publiko laŭdon.

Invititoj prelegis de l'eko ĝis la fino kaptante de l'homo la atenton, eĉ de hort-legomo, kiam temis pri Marko Frateko.

Kaŝtan-festo, manĝ' afrodizia, dosiero, enketo kaj balo, porna filmo post figo ebria:

Estis ĉio ĉi la pipro kaj salo de keja diskut-kunveno tria, tiel faktis, ne okazis malo.

Oratoro

Ekoratoro bezonatas por kunven', estu Hektoro!

Sekureco

Rimarku Jomon: eĉ por skriba seks-enket' uzis kondomon.

Koverulo

Ho vi, kanzone en parnasa ĵusalven', Rodon', rajmone.

Vela barbo

Por log' virina aŭ ĉu por revoluci' ĉi barb' lenina?

Ĉe baro

Servu kelnero al mi per ioma art', fajna Art-ero.

Dani en Usono

Blugina tolo, botoj, ĉevalo, ĉapel', kaj eĉ pistolo!

Gemma

Gemo naiva de nia KEJ-fundament' ŝtono masiva!

Gastronomia

Afrodizia, ambrozia kuir-art' via, Nuria.

Laborŝanĝo

Kio al vi Virgili? Ne plu deprima tristo, vi emas eĉ babili! - Farigis mi pornisto.

Ĉirkaŭŝvarmo

Jen virina homŝvarmo: de soprano ĝis kontralt' allogitaj pro l' ĉarmo plenvenena de Arnald'.

Ĉu Marta?

Denove vok' telefona, insista, ĝena, prizona... -Se vi trafus Graham Bell!!!

Josep Virgili

Memore pri Raymond Schwartz

Daniel Luez (Fonto n-ro 119, majo 1993)

Antaŭ dudek jaroj forlasis nin homo, al kiu nia lingvo multe ŝuldas: Raymond Schwartz. Li forpasis la 14an de majo 1973 post longa kruela malsano kaj estis 79-jaraĝa.

Tiu franca bankdirektoro naskiĝis en Metz la 8an de aprilo 1894, kiam tiu urbo estis germana. Simpatia kaj gaja homo, li metis sian neelĉerpeblan vervon je la servo de esperanto.

Franca specialaĵo estas tipo de varietea spektaklo, nomata *cabareto*, en kiu partoprenas *kanzonistoj*, ĉefe konataj en la pariza kvartalo Montmartre. Tiuj kanzonistoj verkas iujn kanzonojn (ofte laŭ la muziko de jam konataj kantoj aŭ kanzonoj), en kiu ili primokas la aktualajn homojn kaj eventojn.

Ekzistis iam en Parizo tre fama kabareto *Le Chat Noir* (La Nigra Kato) fondita en 1881. Imitante tiun nomon, fondiĝis en decembro 1920 *La Verda Kato*, kies ĉefa organizanto estis Raymond Schwartz. Li forlasis La Verdan Katon en 1925 kaj verkis poemaron *Verdkata testamento*. Poste li fondis alian kabareton *La Bolanta Kaldrono*, kaj poste eĉ trian: *La Tri Koboldoj*. En kafejo de Montmartre kunvenis ĉiumerkrede multaj parizaj esperantistoj, kaj aliaj venintaj el aliaj urboj (kiel mi mem) kaj eĉ el aliaj landoj, kaj ni donis reciproke al ni spektaklon, ĉu per kanzonoj aŭ kantoj, per legado de poemoj, per rakontado de serĉoj. La eksterordinaran etoson ni ŝuldis al Raymond Schwartz, kiu vigligis la kunvenojn per sia nekomperebla sprito. Inter la partoprenantoj estis la plej famaj nomoj de la pariza esperantistaro: Gaston Waringhien, Roger Bernard kaj multaj aliaj.

Sed tio ne estis la sola agado de Raymond Schwartz. Li verkis aliajn librojn humurajn, ĉu versajn (*La*

stranga butiko, *La ĝoja podio*, *Kun siaspeca spico ktp*), ĉu prozajn (*Vole... novele*) kaj eĉ du seriozajn romanojn: *Anni kaj Montmartre* kaj ĉefe (sendube lia ĉefverko plej ŝata) *Kiel akvo de l' rivero*, kiu estas grandparte aŭtobiografia.

Ne nur kanzonisto li estis, sed ankaŭ vera poeto, eĉ se li verkis *sub signo de la gaja muzo* (kio estis lia devizo). Fervora defendanto de la lingvo, li partoprenis en la polemiko pri la demando *ata/ita* kaj verkis kontraŭ *atismo* la libron *Ne kiel Meier*, en kiu li arde defendas la vidpunkton de sia amiko Waringhien.

Por ĉiuj, kiuj konis lin (kaj mi havis la ŝancon esti el tiuj), Raymond Schwartz estas multe pli ol sprita kanzonisto, li estis antaŭ ĉio neforgesebla amiko. Dudek jarojn post lia morto, li havas grandan lokon en nia koro.



Raymond Schwartz

El la 'Suplement de la Gran Enciclopèdia Catalana'

Schwartz, Raymond (Metz 1894-1973) Escriptor i humorista francès en esperanto. Fou l'ànima d'un famós cabaret parisenc en esperanto anomenat *La Verda Kato* ('El Gat Verda') el anys 1920 i *La Tri Koboldoj* ('Els Tres Follets') els anys 1940. A més de molts articles a la premsa esperantista, escriví, entre altres, els llibres poètics *Verdkata testamento* ('Testament del Gat Verd', 1926), *La stranga butiko* ('La botiga estranya', 1931) i *La ĝoja podio* ('La tribuna joiosa', 1949); i, en prosa, *Prozo ridetanta* ('Prosa somrient', 1928), *Vole, novele* ('Tant si vol com si novel·la', 1971) i la novel·la *Kiel akvo de l'rivero* ('Com aigua del riu', 1963).

(Manuel Casanoves i Casals)

Kalocsay, Kálmán (Abjaujszántó 1891-Budapest 1976). Metge, poeta i gra-

màtic hongarès en esperanto. Els seus poemes originals es troben, sobretot, en els reculls *Streĉita Kordo* ('Corda tibant', 1931), *Rimportretoj* ('Retrats en rima', 1931), un dels quals canta el "fort sentiment català" de mossèn Joan Font-Giralt, bon orador en esperanto; i *Ezopa Sago* ('Saviesa d'Isop', 1956). Són magistrals les seves versions en vers de Baudelaire, Dante, Goethe, Heine, Shakespeare, dels hongaresos Madach i Petöfi, i de molts altres. Com a assagista i gramàtic cal citar *Lingvo stilo formo* ('Llengua estil forma', 1931), *Parnasa gvidlibro* ('Guia al Parnàs', 1932) i *Plena Gramatiko de Esperanto* (1935), les dues darreres en col.laboració amb el professor francès Gaston Waringhien.

(Manuel Casanoves i Casals)

Komprenu min, sinjoro policisto

- Ĉu vi ne hontas, vi, persono, kies okupo estas plentempe religia?

- Nu, sinjoro policisto...

- Vi devus esti ekzemplo por ĉiuj. Vi estas kiel patro. Pastro, patro, estas preskaŭ la sama vorto, ĉu ne?

- Jes, sinjoro policisto...

- Vi diros al mi: estas novjaro. Kaj novjaron oni festas. Sed ĉu vi ne havas senton pri respondecoj? Oni festu, jes ja, sed kial festi danĝere?

- Nu, sinjoro policisto...

- Kiam via aŭto trafis tiun muron... Imagu, sinjoro pastro, se tie troviĝus iu, vi tiun mortigus. Pastro mortiganto! Terure! Ĉu vi ne pensis pri tio, kion la popolo disdirus pri vi? Kaj vi scias, kiel facile la popolo ĝeneraligas: ili parolacius ofende pri la tuta religiularo. Pro vi, nur pro vi.

- Jes, sinjoro policisto, sed...

- Vi ĉiam diras "sed" kaj "se". Tamen, via agmaniero estas plejplej hontinda. Mi apenaŭ sukcesas subpremi mian koleron. Kiam mi pensas, ke miaj infanoj iradas al preĝejo - pro mia edzino, kreu min, ne pro mi! - kaj aŭskultas homojn, kiel vi...

- Vi pravas, sinjoro policisto, vi pravas, kaj mi hontas, sed...

- Sed kio? Ĉu vi parolos fine? Se vi havas klarigon, diru ĝin. Kvankam verdire mi ne povas imagi, kiel vi lavos vin el tiu kulpo. Vi estas kulpa, klare kulpa. Vi trinkis tiom, ke vi ne plu sciis, kion vi faras. Uzi aŭton en tiaj kondiĉoj estas ne nur malsaĝe, estas mortige.

- Mi scias, ke mi devus ne fari ion similan. Tamen...

- Tamen kio? Diru, diru do. Kial vi ne parolas? Je la nomo de Dio!

- Bonvolu ne envoki Dion en tiun ĉi malfeliĉan aferon, sinjoro policisto. Mi plezure klarigus, sed vi ne lasas...

- Mi ne lasas vin, ĉu? Kaj vi iros ripeti al la kredantoj, ke polico vin traktis terure. Tro facile. Mi lasas al vi ĉiun eblecon sciigi la faktojn al mi. Jen. Parolu.

- Jes, sinjoro policisto. Dankon, sinjoro policisto. Mi ne diris, ĉu?, ke mi laboras en malsanulejo.

- Laboras? Kian laboron vi faras tie? Vi okupiĝas pri la animoj, ĉu ne? Mi ne nomus tion laboro.

- Kiel plaĉas al vi, sinjoro policisto. Vorto estas, kia oni difinas ĝin. Vi difinas laboron unumaniere, mi ĝin alimaniere difinas. Sed, ĉu mi laboras aŭ ne, tio ne gravas. Fakto estas, ke mi estas la animzorganto de la urba malsanulejo. Ĉu vi scias, kiel disvolviĝas la novjara nokto en malsanulejo?

- Kiel mi sciis? Mi scias, kiel ĝi disvolviĝas en policejo. Ne agrable. Pro stultuloj kiel vi, kun korpo plena je vino, kaj okuloj, kiuj vidas duoble, tiel ke ili mortigas homojn.

- Mi mortigis neniun. Nu, mi estis en la malsanulejo kaj... kiel klarigi? En malsanulejo estas multaj apartaj servoj, kiel oni diras. Servo por kormalsanuloj, servo por haŭt-malsanuloj, servo por rompitaĵoj, servo por malsanaj infanoj, ktp ktp (= kaj tiel plu, kaj tiel plu).

- Vi ne bezonas priskribi al mi malsanulejon. Mi konas.

- Nu, mia funkcio estas rondiri al ĉiuj servoj por viziti la malsanulojn, ĉeesti tiun aŭ tiun alian, kiu baldaŭ mortos aŭ eble eĉ estas jam mortanta. Se vi imagas, ke mi faras nenion, iru foje morti en malsanulejo, kaj vi vidos, ĉu tiuhore vi ne bezonas iun apud vi, iun, kiu kapablas aŭskulti, kompreni, teni vian manon. Sed... Pardonu, mi ne deziras ofendi vin. Nu, mi ĉiam volas esti ĝentila. En novjara nokto, ĝentileco postulas, ke la animzorganto iru al ĉiuj servoj por prezenti siajn novjaraĵajn bondezirojn. Tion mi do faris. En ĉiu servo oni festis novjaron. "Venu, Patro, venu, sinjoro animzorganto", oni kriis al mi, tuj kiam oni vidis min alveni. "Venu festi kun ni. Vi ne malakceptos glaseton da ĉampano, ĉu? Tio estus ofende al ni."

- Kaj vi, kvankam pastro, akceptis!

- Komprenoble mi akceptis. Ĉu vi ne povas bildigi al vi la situacion? Diru "ne" estus agi tre malĝentile kaj ofende. Mi ne povas permesi al mi

havi malbonajn rilatojn. Kiel pastro povus ofendi homojn je novjara festo? Mi do jesis la unuan fojon.

- Kaj certe ankaŭ la duan, ĉu ne? Kaj la trian.

- Komprenoble. Kaj tiam, mi jam komencis malpli bone estri min. Bedaŭrinde, mi nenion manĝis antaŭe, kaj vino kun nemanĝo povas esti tre... tre efika.

- Tiel ke je la kvara servo...

- ...mi ne plu havis sufiĉe da volforto por diri "ne".

- Kiom da servoj estas en via malsanulejo?

- Ĝi estas tiom via, kiom mia: ĝi apartenas al la urbo. En nia malsanulejo estas dudek servoj.

- Vi do trinkis dudek glasojn de ĉampano?

- Jes. Tio estis mia unufoja novjara nokto en malsanulejo. Mi ne sciis, ke ĉiuj servoj estas tiel unuanimaj en sia gusto pri ĉampano. Sed tiel estas. Ĉampanon mi ĉiufoje trinkis.

- Nekredeble!

- Kaj kiam mi alvenis al la elirejo, la du pordistoj min vokis. "Venu trinki, Patro", ili diris. Mi sentis min malforta ĉe la kruroj. "Ĉu vi povus doni al mi kafon, fortan kafon?" mi demandis. Ili estas italoj kaj faras bonegan kafon. "Jes", ili respondis, tute ĝoje, "venu trinki bonan varman kafon, antaŭ ol iri en la malvarmon ekstere".

- Almenaŭ vi faris ion saĝan en tiu nokto.

- Jes. Ili preparis tason da kafo por mi. Kaj lastmomente, ĝuste kiam mi volis preni ĝin, la pli aĝa pordisto elmetis larĝan rideton kaj diris: "Hodiaŭ estas novjaro, oni ne trinkas kafon nur tiel", kaj li faligis en mian kafon belan kvanton da frukt-alkoholaĵo.

- PIRON, Claude. **Vere aŭ fantazie**. Fonto, Chapecó, 1989.

Tri fratoj

Estis iam homo, kiu havis tri filojn. Ekster domo, en kiu li loĝis, li posedis nenion. Ĉiu el la filoj dezirus heredi ĝin, sed la patro amis ĉiujn same kaj li ne sciis kion fari por ne esti maljusta; plej simple estus vendi la domon kaj dividi la monon, sed li ne volis tion fari, ĉar ĝi estis hejmo de liaj patroj kaj prapatroj. Fine li trovis rimedon kaj diris al la filoj: "Iru en la mondon, provu viajn kapablojn kaj lernu ĉiu metion; kiam vi revenos, tiu ricevos la domon, kiu faros plej bonan majstroverkon."

La filoj konsentis. La plej aĝa decidis fariĝi forĝisto, la dua barbiro, la tria skermisto. Ili difinis la tagon de l' reveno kaj foriris. Felice ĉiu trovis bonan majstron kaj plene ellernis sian metion. La forĝisto subforĝis la ĉevalojn de l'reĝo kaj pensis: "Farita estas la afero, la domo estas via." La barbiro razis nur altrungulojn kaj pensis samon. La skermisto ricevis multe da batoj, sed li kunpremis la dentojn kaj ne ĉagreniĝis, ĉar li pensis: "Se vi timos batojn, vi neniam ricevos la domon." Kiam pasis la difinita tempo, ili revenis al la patro; sed ili ne sciis kiamaniere trovi plej bonan okazon por montri sian arton, sidis kune kaj interkonsiliĝis. Subite ili ekvidis leporon, trakurantan la kampion. "Jen ĝi venas kvazaŭ invitita", diris la barbiro, prenis sian pladeton kaj sapon, saŭmigis ĝin, ĝis la leporo proksimiĝis, poste dum ĝia kurado sapumis ĝin kaj razis ĝian barbon: li ne vundetis ĝin, nek kaŭzis doloron. "Tio plaĉas al mi," diris la patro, "se viaj fratoj ne estos pli lertaj, la domo estos via." Post momento galope preterveturis sinjoro en kaleŝo. "Nun vi vidis, patro, kion mi scias," diris la forĝisto, kuris al la kaleŝo, deŝiris de la galopanta ĉevalo la kvar hufeferojn kaj alnajlis kvar novajn. "Brave," diris la patro, "vi ne estas malpli lerta ol via frato; mi ne scias, al kiu mi devas doni la domon." La tria diris: "Permesu ankaŭ al mi, montri mian arton." Ekpluvis, la skermisto eltiris la spadon kaj eksvingis ĝin super la kapo: neniuj guto falis sur lin. La pluvo pligrandiĝis kaj fine la akvo fluis kvazaŭ el kuvo: la skermisto svingis la spadon pli kaj pli rapide kaj restis

tute seka kvazaŭ sub tegmento. Ekmi-regis la patro, vidante tion kaj diris: "Vi faris plej bonan majstroverkon, la domo estas via."

La du aliaj akceptis la verdikton sen protesto. Ĉar ĉiuj tri amis unu la alian, ili restis en la domo kaj ĉiu laboris en sia metio; kiel lertaj specialistoj ili havis grandan klientaron. Ili vivis felice ĝis maljuna aĝo, kaj kiam unu malsaniĝis kaj mortis, la du aliaj tiel ĉagreniĝis, ke ankaŭ ili malsaniĝis kaj mortis. Ĉiujn tri, ĉar ili estis tiel lertaj kaj tiel amis unu la alian, oni metis en unu tombon.

- GRIMM, Fratoj. **Cindrulino kaj aliaj fabeloj** (tradukis el la germana lingvo D-ro Kabe)

Logiko

Familioj, kiuj loĝis en ruldomoj, koleris, ĉar la publikaj instancoj, kiuj faris regulojn pri la ruldomo-tereno ekster unu angla urbo, malpermesis, ke oni havu tie siajn ordinarajn dorlot-bestojn. Kiam ajn la familioj petegadis modifon de tiu regulo, kiu

al kelkaj vere kaŭzis dolorajn problemojn, tiuj lokaj burokratoj insiste malpermesis hundojn, katojn, hamstrojn, kuniklojn.

"Ĉu vi permesas birdojn?" - "Jes, ni permesas birdojn; vi rajtas daŭre havi viajn papagojn, kanariojn, kaj aliajn birdojn."

La familioj finfine donis taŭgan lecionon al la burokratoj. Ili akiris struton, du metrojn altan...

* * * *

En Skotlando, iom post la Dua Mondmilito, oni arestis fiŝiston, ĉar, kontraŭleĝe, li fiŝkaptis per longega ŝnuro, sur kiun li fiksis ducent tridek hokojn. La leĝo preskribas, ke por tiaspeca fiŝkaptado, oni rajtas uzi sur unu ŝnuro maksimume ses hokojn.

Antaŭ la loka juĝisto, la fiŝisto tute ne neis, ke li uzis ducent tridek hokojn. Sed li defendis sin tiel: "Mi fiŝkaptis dun la nokto, kaj en la mallumo mi ne bone vidis, por kalkuli la hokojn."

- BOULTON, Marjorie. **Faktoj kaj fantazioj** (Progresiga legolibro). Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam 1984.

Versareto pri la refleksivo

Li lavas sin facile, en izolo.
Li lavas lin; sed nun laŭ ties volo.

Ŝi manĝas sian pomon - nu, anĝele;
Ŝi manĝas sian pomon - hu, ĉu ŝtele?

Trankvile sian manĝon ŝi digestas.
Digesti ŝian - la eblec' malestas!

Li pinĉas sin - eble vigligas sangon.
Li pinĉas sin - ŝi frapas lian vangon!

Sin regi estas ofte tre necese.
Aliajn ofte regas ni ekscese.

Noblecon de la sinofero vidu:
Lin ne oferu; li por si decidu.

Al ni ni gravas; sciu ni sen ĝem'
Ke ankaŭ ĉiu gravas al si mem.

- BOULTON, Marjorie. **Faktoj kaj fantazioj** (Progresiga legolibro). Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam 1984.

Planlingvoj gazetare

Babelia, la semajna kultura suplemento de la taggazeto *El País*, en sia numero de la 6a de novembro aperigis du artikolojn pri planlingvoj.

La dupaĝa *¿Habla usted klingon?* interesege prezentis la genzon de ekstertera lingvaĵo uzita en la fama usona filmserio *Star Trek*. Tiu idiomo, elpensita de la lingvisto Marc Okrand, fariĝis rimarkinda moda fenomeno en Usono, tiel ke miloj da junuloj studas ĝin: jam aperis pluraj libroj kaj eĉ oni organizas tendarojn por ĝin lerni. Laŭ artikolo pli frue aperinta en *El Temps*, jam disvendigis kvaronmiliono da ekzempleroj de la vortaro.

La *klinga* lingvo ne estas planita por fariĝi internacia. Ĝi estis nur elpensita idiomo por fikcia eksterteragento. Kiel kuriozaĵo, ĉar *klingoj* estas agresemaj, en sia lingvo armeaj terminoj abundas kaj ĝentilaĵoj mankegas: ne ekzistas, ekzemple, ekvivalentoj de *Saluton* aŭ *Bonan tagon*, dum la ŝajne nura salutformo estas *Kion vi volas?*

Bedaŭrinde post tiu bone verkita atentokapta artikolo sekvis en la sama suplemento malsukcesa tutaĝa informo titolita *El sueño de una lengua universal*. En ĝi la aŭtoro detale prikomentas diversajn historiajn strebojn al *filozofia* lingvo. En tia lingvo, prirevita i.a. de Descartes kaj Leibniz, la vortoj posedus purajn nekonzufizeblajn signifojn, eĉ ili estus nur elementaj ideoj, el kiuj eblus elkonstrui per kunmeto ĉiun eblan malsimplan koncepton.

Kompreneble, post konstatigi la maleblon de tiu programo, la aŭtoro resumas la historion de la internaciaj

helplingvoj. Bedaŭrinde li nur supraĵe pritraktas la temon, kaj kuraĝas aserti, ke per la voĉdonado de 1894, laŭ kiu la esperantistoj decidis lasi netuŝebla la fundamenton de sia lingvo, esperanto estiĝis "kvazaŭ mumiigita". Poste li asertas, ke ido estas "plibonigita kaj simpligita versio de la origina esperanto" kaj konkludas, ke "ido verŝajne estas la plej bona projekto de internacia helplingvo". La aŭtoro forgesas eĉ skizeti pravigon pri tio.

La aŭtoro eĉ finas sian artikolon asertante, ke "en la neperfekta mondo, en kiu ni vivas, tiuj, kiuj kiel mi rigardas kun simpatio la projekton de universala lingvo, havas neniun alian eliron, ol aliĝi al la angla". Ŝajne li opinias, ke eblas lerni nur unu fremdan lingvon.

Estas tre gratulinde, ke la ĉefa hispania taggazeto dediĉis tri plenajn paĝojn al planlingvistiko. Bedaŭrinde la amuza *klinga* estis multoble pli bone pritraktita ol esperanto.

Aŭtomate fuŝtraduki

La hispanlingva revuo pri komputiko *Binary* publikigis en sia septembra numero longan studon pri kvin diversaj aŭtomataj traduk-programoj por personaj komputiloj. Kvankam la prezo de tiuj programoj foje superas 150 000 p-tojn, testo farita de la revuo pruvas, ke la atingitaj rezultoj ridindigas ĉiun ajn.

Binary tradukigas al ĉiu programo la saman tekston aperintan en la faka revuo *The Economist*. La fuŝojn oni rimarkas tuj rigardante la titolojn: "Power needs clear eyes" ("Povo be-

zonas klarajn okulojn", t.e. 'La potencoj bezonas klarajn ideojn') estas hispanigitaj kiel: 'Poder necesariamente ojos claros', 'Potencia necesidades quitar ojos', 'Las necesidades de poder aclaran ojos', 'Poder necesita ojos claros', 'El poder necesitan ojos claros'.

Tamen, la tradukiloj ne nur misas ĉe malfacilaj lokoj. "300 American and French soldiers" ('300 usonaj kaj francaj soldatoj') estas elangligita kiel: '300 Americano y soldados del francés', '300 Estadounidense y soldados Franceses', '300 Americano y soldados Francés', '300 americano y soldados franceses', '300 soldados Americano y Francés'.

Kiel lastan ekzemplon, ni citu la komencan frazon "A great power knows it is dangerous to be seen to flinch" ('Granda potenco scias, ke estas danĝere, ke oni ĝin vidu dubi') tradukiĝas jene: 'Un grande poder sabe que está peligroso se cuida de vacilación', 'Un grande poder sabe es peligroso a se @ +visto para acobardar' [tiel!], 'Un gran potencia sabe es peligroso para ser visto para acobardarse', 'Un gran poder conoce es peligroso para ser visto para flinch', 'Un gran poder sabe es peligroso para estar visto vacilar'.

Laŭ la artikolo tiuj programoj momente uzeblas nur en du kazoj: por produkti komencan ektradukon, kiu ŝparigas la plej rutinajn traduklaboron, aŭ por rapidege havigi al si malneton por supraĵe kompreni tekston.

Aŭtomata tradukado certe post kelkaj jaroj sukcesos ĉe plimulto de la fakaj tekstoj, sed ni povas konstatigi, ke momente, la tiucelaj programoj por personaj komputiloj estas tre for de siaj celoj.

FREQÜÈNCIES

REVISTA DE LLENÇÜES I POBLES